

jen
BULTENO
ELDONATA DE LA
VOL 3
NO 2 (H)
1964
HARVARD
RADCLIFFE
NUMERO
SAT
R

JEN-Bulteno Organo de la Junularo Esperantista de Nord-Ameriko
Marto 1964

Sendu kotizojn al: Stanley F. Cohen, 16 Long Avenue, Allston, Massachusetts 02134.

Sendu materialon por la maja numero de la JEN-Bulteno al: Harvard-Radcliffe Esperanto Club, Quincy House Box 8, Harvard University, Cambridge, Massachusetts 02138.

Sendu materialojn por aliaj numeroj de la JEN-Bulteno, kaj ĉion alian, al: Richard P. Kollin, 30 Avenue B (4A), New York, New York 10009.

La maja numero de la JEN-Bulteno estos speciala numero, kun la temo, "Kio mankas en la Esperanto-Movado?"

Ĉi tiun numeron gastredaktis la Esperanto-Klubo de Harvard kaj Radcliffe.

Estraro de JEN:

Richard P. Kollin.............Sekretario
Allan E. Fineberg.............Redaktoro
Stanley F. Cohen..............Kasisto
John F. Kooistra..............Komisiito pri Universitatanoj
Humphrey R. Tonkin............Komisiito pri Eksterlandaj Aferoj
Jonathan R. Pool..............Komisiito pri Varbado

ENHAVO

Vojkruciĝo (J. Pool)........ 3
Bedřich Smetana (E. Lewis)........ 5
Kion la Aliaj Faras........ 7
Greka Kanzono (Miĥaelo)........ 9
La Elektoj de JEN........ 10
Se Vi Estas en... ........ 11
Studentoj en Polujo (M. Liwszyc)........ 13
Konkurso........ 15
Drinkantoj el Ĉiuj Landoj Unuiĝu... ........ 18
20-a I.J.K. de T.E.J.O. ........ 20
La Junulara Somero........ 23
Oratoraj Konkursoj en 1964........ 24

Gravaj Sciigoj........ 10, 22
Deziras Korespondi........ 4, 25

## VOJKRUCIĜOJ

Jonathan Pool

Se oni proponus al vi la eblon dum unu somero loĝon kaj laboron kun popolo tre malsimila al la nia, en etoso instiga al amikiĝo kaj interkompreniĝo, ĉu vi akceptus? Nu, precize tio estas la propono de 'Operation Crossroads Africa' (Projekto Vojkruciĝo Afriko). Ĉiusomere, OCA sendas du jetojn da studentoj al Afriko, duono al orienta, kaj duono al okcidenta Afriko. Tie ili dividiĝas en malgrandajn grupojn kaj disiras al proksimume 20 diversaj landoj. Estas ĉirkaŭ 30 grupoj entute; ĉiu havas 10-15 membrojn kaj unu gvidanton. Kaj ĉiu grupo pasigas la someron en vilaĝo, manlaborante ĉe komunuma konstru-projekto. Kutime, kun la grupo loĝas ankaŭ grupo de universitataj studentoj de la lando kiu gastigas la amerikanojn. La amerikaj kaj afrikaj studentoj kune laboras en la konstruado, kaj ofte ankaŭ la vilaĝanoj kunlaboras. Dum la nelabora tempo, okazas multe da konversaciado kaj diskutado inter la studentoj, vizitado al la hejmoj, preĝejoj, farmoj, ktp. de la vilaĝo, solenaĵoj, kaj reciproka lernado pri la vivo, kutimoj kaj pensoj de la aliaj.

Notu ke la projekto "estas nek turista vojaĝo nek safaro" - se vi partoprenos, vi ĝuos nek komfortan lukson nek romantikan aventuron. Vi ŝvitos en la peza, malpura, subsuna laboro. Vi atendeble fariĝos malsaneta kelkfoje, kaj eblete fariĝos malsanega. Pro la bariloj inter la kulturoj kaj inter ĉiuj homoj, kaj pro la intensa proksima kunvivo, estos malfacile rilati sukcese kun la afrikanoj, kaj eĉ kun la aliaj amerikanoj. Entute la somero ne milde traktos viajn sentojn kaj sentumojn.

Sed en OCA vi povos en mallonga tempo ekkoni afrikan landon kaj popolon pli profunde ol per iu alia maniero: via laborado estos ŝlosilo al akcepteco kaj amikeco al vi de la komunumo ek de la komenco. Je la fino vi forlasos multajn amikojn, precipe la studentojn kaj la vilaĝajn infanojn; vi forlasos ankaŭ solidan memorigilon pri via restado: lernejon, komunuman centron, malsanulejeton, aŭ alian konstruaĵon (unu grupo rearbarigis parton de Egiptujo). Antaŭ la reflugo, vi vojaĝos dum unu-du semajnoj por povi kompari la lokon kie vi restis kun aliaj landoj kaj regionoj.

Krom la studentaj grupoj, OCA sendas kelkajn fakistajn grupojn, ekzemple de instruistoj, kuracistoj, kaj sportistoj. Kaj eĉ la studentaj grupoj enhavas ne nur studentojn, sed ankaŭ kelkajn junajn ne-studentojn (precipe eksstudentojn). Ĉiuj grupoj, kaj la organizo mem, estas miksitaj - rase, religie, kaj sekse (kaj iomete

nacie, ĉar oni akceptas kelkajn grupanojn de Kanado kaj Meksikio).
Se ĉi tiu propono interesas vin, mi konsilas al vi tuj skribi al:

Operation Crossroads Africa
150 Fifth Avenue
New York, N.Y. 10011, Ŝtatunio.

Unika travivaĵo atendas vin!

(noto de la red: Jonathan Pool, estrarano de la Esperanto-Klubo de Harvard, pasigis la pasintan someron en Afriko kiel partoprenanto de ĉi tiu Projekto)

---

DEZIRAS KORESPONDI....

KUN gejunuloj 16-20-jaraj ĉeestinto de la 19-a TEJO-Kongreso en Vraca - IVAN ANGELOV, vil. Simeonovec, Pazarĝiŝko, Bulgario.

16-JARA bulgarino, ankaŭ ĉeestinto de la Kongreso en Vraca - VALJA DEĈEVA, Tolbuĥin 23, Kubrat, Bulgario.

16-JARA lernejano el Sovetunio; ankaŭ interesiĝas pri interŝanĝo de jazdiskoj - PETER BIELIAUSKAS, Žvaigždžiy 9-1, Kaunus 18, Sovetunio.

KURSGVIDANTO serĉas korespondantojn por siaj kursanoj; diversaj aĝoj kaj interesoj; ambaŭ seksoj - ANTS MIKK, Aia 12, Abja Paluoja, Estonio, Sovetunio.

17-JARA studento, pri filmoj, arto, aŭtoj; volas interŝanĝi fotojn kaj diskojn - AIEKSIS KIRSJAEV, ul.Pervomajskaja d.50 kv.43, Tula, Sovetunio.

JUNA komenca esperantistino - RAJNA ST. GANCEVA, Kl. Gotvald N.35, Sofia 4, Bulgario.

PRI ĉiuj temoj, kaj precipe turismo, muziko, poezio kaj floroj, lernantino en la 10-a klaso de mezlernejo - EWA STERING, Bydgoszcz, ul.Lukasiewicza 8/42, Pollando.

Grupo de gekursanoj 12-16-jaraj, pri ĉiuj temoj - ESPERANTO-KURSO, Pionerski dom, Vraca, Bulgario.

BEDŘICH SMETANA

Ellen A.Lewis

Unu el la komponistoj kiuj plej multe interesas min, Bedřich Smetana, naskiĝis la 2-an de marto en Litomysl, Bohemio. Lia patro, bierfabrikisto, intencis ke Bedřich, lia unue naskita filo, estos ankaŭ bierfabrikisto. Mi foje legis historieton, ke kiam Frantisek Smetana lernis, ke li estas patro de neina infano, li estis tiom kontenta, ke li dancis polkon. Kvankam tute nekredebla, tiu anekdoto donos al ni ideon pri la feliĉeco de la patro de Bedřich Smetana.

Sed Frantisek amis ankaŭ la muzikon, kaj kiam la eta Bedřich (pr: Bed-rjih) estis nur kvarjara, li jam ludis la violonon. Poste, li studis la pianon, je kiu li ankaŭ havis multe da talento. Sed kiam li anoncis al sia patro, ke li volas esti muzikisto, la patro, pensadante pri la bierkomerco, ne volis ke Bedřich estu profesia muzikisto. Sed lia kuzo Josef konvinkis la patron.

Mi ne intencas priskribi aŭ sumigi la vivon de Bedřich Smetana. Interesas min tio, kion li signifas por ni. Li estas la patro de la ĉeĥa nacia muziko. En sia patrujo li estas granda kaj grava heroo. Inter multaj agoj, li fondis muziklernejon en Praha (1848), direktis operojn (kaj siajn proprajn kaj tiujn de aliaj komponistoj) inter 1862 kaj 1874, kaj helpegis fondi la Nacian Teatron, kiu ekzistas ĝis nun. Oni malfermis la Teatron la 11-an de junio 1874, ludante "Libuŝe", patruja opero de Smetana (lau la tradicio, la reĝino Libuse fondis Praha-n antaŭ preskaŭ mil jaroj). Du monatojn poste, la teatro mem forbrulis. Oni rekonstruis ĝin kaj ree malfermis ĝin, ludante denove "Libuŝe", en 1883).

Multaj homoj opinias, ke Antonin Dvořák estis pli grava komponisto ol Smetana. Sed estis la influo de Smetana, kio multe helpis doni al la juna Dvořák liajn oportunaĵojn. Ĉar Smetana pensis multe malpli pri si mem ol pri la junaj muzikistoj kiuj devis daŭrigi la ĉeĥan muzikon. Kvankam Smetana pasigis plurajn jarojn en Svedujo kaj alie, li ne kaptis la okazon fariĝi bone konata muzikisto en la ĉefurboj de gravaj landoj. Li estis tro okupata estante estro kaj gvidanto de la ĉeĥa muziko.

Lia vivo konsistis kaj el triumfoj kaj el tragedioj. Ne al

ĉiuj plaĉis liaj fervoro kaj viglo. Laŭ la aristokratoj kaj aliaj, lia muziko, precipe liaj operoj, estis tro "ĉeĥaj". Praha jam havis longan muzikeman tradicion, sed ĝi estis germana, kio estis (oni povas konsideri) pli internacia. Ni memoru, ke Praha amis Mozart kaj bone akceptis lian muzikon. Tiun germanan tradicion Smetana bone konis: li ankaŭ amis Mozart, Beethoven, Schumann kaj Liszt - kiun li bone konis kaj kiu helpis lin je la komenco de lia kariero.

Sed estis ankaŭ pli naciemaj homoj, kaj ili diris, ke la muziko de Smetana ne estas sufiĉe ceha sed tro germana - specife tro Wagner-ema.

En 1874 Smetana subite (malsimile ol ĉe Beethoven) surdiĝis, tute surdiĝis. Post tio li nenion aŭdis - eĉ ne la sonon de la propra voĉo. Kaj post 1880 li suferis plurajn cerbatakojn, ĉar la malsano estis en la nervoj kaj la cerbo, ne en la oreloj. La remalfermon de la Nacia Teatro li ne povis ĉeesti; kaj finfine, en 1884, oni devis meti lin en la frenezulejon de Praha, kie li mortis la 12-an de majo.

Sed baze Smetana ne estis malfeliĉa homo. Jen ekzemplo: en 1854 li perdis pro morto unu el siaj du filinetoj. La knabineto ne estis eĉ 5-jara, kaj ŝi jam havis grandan intereson pri la muziko. Ŝi aŭskultis kiam Bedřich ludis ĉeĥajn popolkantojn aŭ muzikon de Chopin, kiun Smetana multe ŝatis. Du monatojn post la morto de la eta Bedřiŝka, Smetana finis terceton, komponitanje ŝia memoro. Tiu verko ja ne estas gaja, sed je la fino la notoj supreniras triumfe. - Kaj tiun belegan komponaĵon "Vltava" (la Moldau) li verkis unu monaton post sia eksurdiĝo. Sendube la rigardo, aŭ eĉ la pensado, je tiu bela rivero, kiu trafluas Praha-n, konsolis lin. Smetana verkis ankaŭ du kvartetojn, "El mia Vivo". La unua enhavas tre altan, longan noton, kiu reprezentas lian eksurdiĝon. La dua, komponite en 1882 kaj 1883 spite de lia malboniĝanta malsano, multe inspiris al Schönberg.

Smetana verkis ok operojn kaj komencis naŭan. Li neniam opiniis ke "La Vendita Novedzino" estas lia plej grava opero. Laŭ li, la 'naciaj' operoj, kiel "Libuŝe" kaj "Dalibor" estis multe pli signifaj. Sed al la ĉeĥa popolo kaj al ni la plej vere 'nacia' estas "La Vendita Novedzino". Kiam la nazioj invadis Praha-n, ili malpermesis ludon de precize tiu opero. Unu interesa afero estas ke generale la operoj kaj simfoniecaj poemoj (precipe tiuj de "Ma vlast" - Mia Patrolando - el kiuj "Vltava"

estas la dua) kaj ĉambra muziko estas facile aŭskultebla kaj, mi supozus, ludebla. Sed Smetana ankaŭ verkis pianajn verkojn kiuj, malgraŭ titoloj kiel "Ĉeĥaj Polkoj kaj Dancoj", estas treege malfacilaj. Estas malfacile ludi ilin, kaj versajne ne eblas danci je ili. Pasante, Smetana komponis pianomuzikon dum sia tuta vivo.

En Praha estas Smetana-muzeo, (kaj estas aliaj en Litomysl kaj Jabkenice, kien li transloĝiĝis post la oksurdiĝo) kaj se mi iutage vojaĝos al Ĉeĥoslovakio, mi certe intencas viziti ĝin.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

<u>KION LA ALIAJ FARAS</u> - - - Novaĵoj el la esperantista mondo........

GERMANUJO:

Je Novjaro renkontiĝis en Munkeno la plej sukcesa kaj multnombre ĉeestata Internacia Seminario de la Germana Esperanto-Junularo ĝis nun. Ĉeestis pli ol cent junaj geesperantistoj el aro da europaj landoj, kaj prelegis al la seminario (kiu havis kiel ĉeftemon "Eŭropa kulturo - ĉu unueco en vario?") i.a. d-ro Victor Sadler, redaktoro de <u>Esperanto</u>. Ĉi tiu estis la sepa I.S. kiu ĝis nun okazis.

HUNGARIO:

La 15-an de decembro fondiĝis en Budapest la Hungara Esperanto-Junularo, kiel junulara sekcio de HEA kaj landa sekcio de TEJO. HEJ planas someran renkontiĝon apud la Lago Balaton.

VATIKANO:

La enciikliko de la Papo Johano XXIII "La surtera paco" lastatempe eldoniĝis ankaŭ en Esperanto, kiel la tria en serio de kajeroj de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. IKUE kongresos ĉi-jare dum julio en Valencia (Hispanujo). Kongresoj de IKUE okazas ĉiun duan jaron.

ISRAELO:

Esperanto-Ligo en Israelo decidis fondi Kooperativan Eldonejon. La unua planata eldonaĵo estas "Hebrea Antologio" La redaktoro estos J.J. Kohen-Cedek.

JUGOSLAVIO:

Laŭ informo en la gazeto Jugoslavia Esperantisto, ek de 1964 reaperos la kultura kaj literatura revuo Suda Stelo, kiu antaŭ kelkaj jaroj estis inter la plej elstaraj esperantaj periodaĵoj. Lastatempe la reguleco de tiuj esperantaj gazetoj kiuj aperas en Jugoslavio iome ŝanceliĝis (laŭ nia scio, tute ne aperis dua numero de la popularscienca gazeto Homo kaj Kosmo, kaj Scienca Revuo finfine aperis post longa prokrasto, sed tiel plenplena je preseraroj ke ĝi apenaŭ legeblas!). Ni devos do pacience atendi.

MADAGASKARO:

La madagaskara TEJO-sekcio lastatempe reorganiziĝis, kaj havas grandajn planojn por agado dum 1964. Interalie, ĝi esperas aperigi tutafrikan junularan bultenon en Esperanto - kiel komencon de aparta agado pri Esperanto inter la afrika junularo.

SOVETUNIO:

En la Universitato de Moskvo f-ino Vera Zlotnikova (estraranino de la studenta organizo STELO) preparos kun la aprobo de la universitataj instancoj disertacion pri "romidaj elementoj en la Internacia Lingvo", sub la gvido de prof. E. Bokarev (en Pollando, lastatempe sukcese magistriĝis ĉe la universitato de Varsovio Roman Dobrzynski, per disertacio pri la Esperanto-gazetaro).

BRITUJO:

En sia oktobra numero, "The Linguist" publikigis leteron de s-ro C.J. McMullen, juna aktivulo de la brita TEJO-sekcio, pri la koncizeco de la ĉefaj lingvoj.

Komparante la saman tekston en sep tradukoj, la aŭtoro konstatis jenan longecon:

| | |
|---|---|
| - angla | 67,4 linioj |
| - hispana | 66,6 linioj |
| - itala | 68,1 linioj |
| - Esperanto | 71,2 linioj |
| - franca | 74,2 linioj |
| - rusa | 80,7 linioj |
| - germana | 91,0 linioj |

La revuo "The Linguist", eldonata en Londono, aperadas en la sep menciitaj lingvoj, do inkluzive de Esperanto. (laŭ "Heroldo").

USONO:

Laŭ informo el la oficejo de ELNA, la artikolo pri Esperanto en la februara numero de <u>Catholic</u> <u>Digest</u> rezultigis amasegon da informpetoj al ELNA.

AŬSTRALIO:

Dum la Aŭstralia Kongreso de Esperanto en Melbourne je Novjaro, fondiĝis ankaŭ en Aŭstralio sekcio de TEJO. La organizo, AEJO, starigis proksimajn rilatojn kun la landa asocio. Sekretario estas la juna (17-jara) Daniel Kane.

HISPANUJO:

Kvankam jam dumlonge ekzistis lektoratoj pri Esperanto en pluraj universitatoj (i.a. Liverpool, en Britujo, kaj Amsterdam, en Nederlando), ĝis nun en la tuta historio de Esperanto ne estis sendependa katedro de Esperanto. Nun oni fondis la unuan, en la Universitato de La Laguna, kies Senato nomis d-ron Juan Régulo Pérez, konata eldonisto de Esperantaj libroj, sia unua Profesoro de Esperanto. D-ro Regulo Perez estas jam profesoro pri romanidaj lingvoj en la universitato.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

<u>GREKA</u> <u>KANZONO</u>

En Ateno dum vespero
Vage iris stranga vir'.
Oni nomis lin Homero;
Kaj li pensis kun sopir':

"Por mi jen nun laborado
Ĉar laŭ mi ja decas ke
Skribu mi pri l'Iliado,
Ankaŭ eĉ pri l'Odise'."

Li do prenis skribmaŝinon
Kune kun la Fundament',
Kaj laboris kun obstino,
Kun zorgemo kaj atent'.

Li fininte, kun jubilo,
Diris: "Vere ĝojas mi,
Ke stultuloj post jarmiloj
Arde studos tion ĉi!"

- Miĥaelo -

GRAVA SCIIGO : GRAVA SCIIGO : GRAVA SCIIGO : GRAVA SCIIGO : GRA

## LA ELEKTOJ DE J.E.N.

Finfine alvenis la tempo, kiam JEN devas elekti sian novan Estraron. La nuna Estraro (vidu la internon de la antaŭa kovrilo) deĵoros ĝis la 1-a de septembro, 1964. Ĝi konsistas pli-malpli el tiuj samaj personoj kiuj fondis JEN (3 en Novjorko kaj 3 en Cambridge), kaj neniam ĝis nun ĝi ricevis la oficialan subtenon de la membroj. En 1963 la membroj akceptis statuton, kiu estas ilo por demokrata transdonado de la gvida rolo en JEN. Sed tiu ilo funkcios, kompreneble, nur se ni ĉiuj vigle uzos ĝin, t.e. aktive partoprenos la elekton, de la komenco al la fino.

Kaj la komenciĝo estas jam nun. Konforme al la statuto, la Estraro antaŭnelonge decidis, ke la venonta Estraro havos sep membrojn - t.e. unu pli ol ĝi havas nun. Tio signifas ke ni devas havi almenaŭ sep kandidatojn, kaj ni bezonas vin por provizi tiujn kandidatojn. Laŭ la reguloj, por ke ies nomo aperu sur la balotilo, la oficejo de JEN devas ricevi, antaŭ la unua de majo, proponon de lia kandidateco, subskribitan de almenaŭ du membroj de JEN. Ĉiu propono povas porti deklaron ĝis 100 vortojn longan favore al la kandidato. En la maja numero de la JEN-Bulteno aperos la deklaroj por ĉiuj kandidatoj kaj balotilo por la voĉdonoj de la membroj.

Do, JEN-anoj, jam ne kaŭru sub la ŝirmilo de anonimeco; ekstaru kaj prenu la gvidadon de JEN en viajn proprajn manojn, kie ĝi devus esti. Se vi deziras esti Estrarano, kontaktu aliajn JEN-anojn kaj igu ilin proponi vin! Se vi konas alian JEN-anon kiu estus bona estrarano, kontaktu lin kaj aliajn membrojn kaj proponu lin. Nur per via kunlaboro ni povas trovi novajn personojn, kaj tiel novajn ideojn, por la estrado de nia organizo. Ni atendas proponojn de vi, aŭ por vi!

(daŭrigo sur venonta paĝo)

---

La modela moro - l'amo de l'amoro

VA SCIIGO : GRAVA SCIIGO : GRAVA SCIIGO : GRAVA SCIIGO : GRAVA SC
= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

Tiajn proponojn vi sendu al: JEN, 30 Avenue B, New York, N.Y., 10009. Bonŝancon!

(Komprenneble, se vi ĝis nun neglektis ĝisdatigi vian membrecon, vi povos nur de spekta, ne de partoprena, pozicio ĝui la viglan kaj streĉan elektan procezon, kiu nun komenciĝas. Do ne prokrastu, ne maltrafu la karavanon, sed tuj remembriĝu! Sendu nur unu dolaron al la kasisto de JEN: Stanley Cohen, 16 Long Avenue, Allston, Mass., 02134)

Vidu la anoncon pri 'Konkurso', en ĉi tiu numero!

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

Se vi estas en...

NOVJORKO, la junularo kunvenas ĉiun dimanĉon ĉe la Pola Nacia Domo, St Mark's Place (8th Street). Telefonaj informoj haveblas ce: YU2-3217.

CAMBRRIDGE kaj BOSTON, la Esperanto-Klubo de Harvard organizas komunan vespermanĝon ĉiun duan semajnon, kutime merkrede. Ĝi ankaŭ okazigas, ĉiun duan dimanĉon t.n. Seminarion por tiuj kiuj bone parolas Esperanton. Por informoj telefonu al: UN8-6007 aŭ 876-1985.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

LABORO DE U.E.A.:


Laŭdire, la urbo de la Universala Kongreso de '69 estas jam fiksata. En Parizo?

---

L'amo de l'amoro - lamo de la moro

Anonco:

La gazeto El Popola Ĉinio estas senpage ricevebla dum 1964 por ĉiuj Esperantaj grupoj, kiuj sciigas al ni sian deziron kun indiko de (1) nomo kaj adreso de la grupo (preslitere); (2) nombro de la membroj; (3) nomo kaj adreso de la prezidanto aŭ sekretario; (4) se estas biblioteko, ankaŭ nomo kaj adreso de la bibliotekisto. La sola devo estas elmontri la ricevitajn gazetojn dum klubaj kunvenoj, aŭ alimaniere al la membroj. Skribu tuj al: Ĉina Esperanto-Ligo, P.O.Kesto 77, Pekino, Ĉinio.



Mi rekomendas, s-ro Weston, ke vi iometete malstreĉiĝu en la batalo kontraŭ neologismoj.

STUDENTOJ EN POLUJO

Maria Liwszyc

Laŭleĝe ĉiuj havas rajton esti studentoj en Polujo, sed oni povas demandi, ĉu tiu rajto estas reala. En Polujo oni faris multon por ebligi al ĉiuj saman starton.

Konsideru la koston de studenta vivo. Neniam oni devas ion pagi, kaj al malriĉaj homoj estas sufiĉe altaj stipendioj, kiujn pagas la ŝtato. Tiu, kiu venis de alia loko, povas havi preskaŭ senkostan loĝejon. Preskaŭ ĉiu povas ankaŭ manĝi en studentaj restoracioj por tre malalta prezo. Estas ankaŭ studentaj rabatoj ĉe transporto kaj preskaŭ ĉiuj kulturaj aranĝoj, kaj kompreneble la medicina helpo estas tute senpaga. Al tiu, kiu tute ne havas helpon de sia familio, ĉio tio povas ne sufiĉi, sed per la studentaj kooperativoj ili povas facile trovi kelkhoran laboron.

Kompreneble, por ricevi helpon de la ŝtato oni devas esti bona studento, t.e. sukcesi en la ekzamenoj. Por eniri superan lernejon, necesas fini mezlernejon kun sufiĉe bona rezulto; tamen la konkurado ne estas tiom sovaĝa nun kiom antaŭe.

En la medicina fako, kiam mi komencis estis 7 kandidatoj por ĉiu loko. La medicino estas tre populara, kaj, kontraŭe al Usono, plej multaj studentoj estas virinoj. Oni elektas inter la kandidatoj per tre malfacilaj ekzamenoj kaj per la opinioj kaj rezultoj de la mezlernejoj. Poste oni rigardas al la socia deveno de la kandidato: oni plej nombre sukcesigas la infanojn de laboristoj kaj kamparanoj. Oni ĉiam diras, ke tia elektado ne estas tre bona: multe da studentoj finas siajn sciencajn karierojn post unu au du jaroj, kaj la ŝtato perdas multe da mono kaj kapablajn personojn.

La unua jaro estas malfacila. Oni povas tre facile perdi la rajton esti studento; do plejparte oni multe laboras. Vere, la laboro neniam finiĝas, se oni volas resti sur la nivelo de la nuntempa scienco. Tamen, se oni volas nur trapasi la ekzamenojn, oni trovas multan liberan tempon, krom en la printempo kiam okazas la ekzamenoj. Tiam oni solvas la problemojn de 24-hora labortago per nigra kafo kaj malvarma akvo, kiun oni verŝas sur sian ne plu kapablan kapon. La ekzamenojn ni trapasas, sed ĉu io longe restos en la kapo? Tamen, tiun manieron de lernado oni praktikas tre vaste, kaj, mi opinias, ne nur en Pollando.

Libera tempo ne estas sama por ĉiu. Prelegoj ne estas devigaj, kaj estas okazoj, kiam aŭditorio por 300 personoj (tiel nombra estis mia kurso) estis tute malplena, kun nur 7-9 personoj en ĝi! De tempo al tempo la profesoro legas ies nomon el listo, sed ĉiam troviĝas iu solidara kolego kiu respondas. Profesoroj plendas kaj faras malfacilaĵojn pri subskriboj en la semestra libro (ĉiu studento devas havi tian libron), sed tio ne multe helpas, kaj plejmulte oni lernas per libroj. Do, tiu kiu ne interesiĝas pri prelegoj havas vere multe da tempo, kaj al tiu kiu volas aŭdi prelegojn preskaŭ ĉiu tago estas okupita.

Do restas sabatovesperoj kaj dimanĉoj. Estas multaj eblecoj bone pasigi tiun tempon. Estas multeĝaj lokoj, kie oni povas danci je studentaj orkestroj. Krome, estas multaj teatroj (en Varsovio pli ol 20), kinejoj, operejoj, koncertejoj, kaj aliaj fontoj de amuzo. La tre viglaj studentaj domoj havas sennombrajn klubojn, el kiuj ĉiu homo trovas ion por si. Mi gvidis tie dum unu jaro studentan Esperantan kurson. La plej famaj studentaj domoj en Varsovio estas "HYBRYDY" kaj "STODOLA". Estas ankaŭ multaj studentaj teatroj. La plej fama estas STS.

Ni havas ankaŭ libertempon pli ol tri monatojn longan. La studentaj organizoj helpas al siaj membroj bone kaj profite ilin pasigi. Ekzistas pluraj tiaj organizoj—kutime ne politikaj (iom simile al laboristaj unioj), sed kelkfoje politikaj.

Bedaŭrinde mi ne povas en unu artikolo diri ĉion pri la vivo de la studentoj. Entute, estas bone esti studento en Pollando!

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

Estis homo kiu diris, Ho JEN!
Estas tempo por pagi almen-
-aŭ dolaron membriĝi
aŭ abonantiĝi
Al tiu neprega Bulten'.

Kaj vi? Ĉu vi ne rimarkis ke membreco al JEN nepregas? Kiu speco de Esperantisto vi estas? JEN estas la junularo ĉi-loke. Kaj ĉiu scias ke la junularo nepregas. Sendu vian kotizon tuj al: Stanley F. Cohen (Kasisto de JEN), 16 Long Avenue, Allston, Massachusetts 02134.

# KONKURSO

VI POVAS VENKI!!! Inter la ĝustaj solvoj, kiuj alvenos antaŭ la fino de aprilo, unu estos elektita per lotumo. La bonŝanca sendinto de la elektita solvo ricevos kiel premion belan Esperantan libron. Oni anoncos la nomon de la venkinto en la maja numero de la JEN-Bulteno. Do sekvu la jenajn instrukciojn!

Instrukcio 1. Fortondu ĉi tiun paĝon inter ĉi tiuj du linioj (la tondo devas ne tranĉi iun el la linioj ie ajn).

Instr. 2. Skribu viajn nomon kaj adreson en ĉi tiu rubriko. La adreso devas inkluzivi Zip-numeron se vi estas en Usono.

Instr. 3. Faldu ĉi tiun paperon kiel eble plej precize sur ĉi tiu linio, tiel ke ĉi tiu flanko de la papero fariĝos la interna flanko.

Instr. 8. Gluebendu ĉi tie kaj ĉi tie.

Instr. 7. Faldu sur ĉi tiu linio, kovrante la ridetan vizaĝon.

Instr. 10. Tuj enpoŝtigu!

Instr. 9. Gluu poŝtmarkon ĉi tie.



S-ro Stanley F. Cohen
Kasisto de JEN
16 Long Avenue
Allston, Massachusetts 02134

Instr. 6. Enmetu $1 en la internon de ĉi tiu papero por via: (X-u unu):

- [ ] JEN-membreco
- [ ] Remembreco
- [ ] Abono al JEN-B
- [ ] Reabono

Instr. 5. Gluebendu la faldojn de ĉi tie al ĉi tie.

Instr. 4. Faldu sur ĉi tiuj linioj, kovrante la ekstremajn finojn de ĉi tiu frazo.




Ĉe Harvard, preskaŭ ĉiu legas la JEN-Bultenon.

DRINKANTOJ EL ĈIUJ LANDOJ UNUIĜU POR OPONI NIAN KOMUNAN MALAMIKON!

La heroa batalo de la aŭstralia popolo kontraŭ la fortoj de seka diktatoreco.

Trinkante tiun noktomezan viskion ĉe angulo de la baro, kie la vivproblemoj retiriĝis kaj, por iel tordi la poeton, "la homo grandas kaj la tempo etas", tamen konservu penseton por la kompatindaj aŭstralianoj.

Du horojn antaŭ la Novjaro, kiel okazis en Aŭstralio dum epokoj, miloj da festantoj denove trovis sin forĵetitaj el trinkejoj, sen la ebleco reenveni. Ĉar la trinkejoj tute simple fermiĝis. "Estas diabla maniero komenci novan jaron - seka kiel boto" kriis unu havenlaboristo dum la pordo brufermiĝis guste antaŭ lia vizaĝo. Per tiuj vortoj li parolis por ĉiuj subpremataj trinkantoj de Aŭstralio, kiuj suferas sub leĝoj foje nomataj "la plej barbaraj kaj arkaikaj trinkaj leĝoj en la mondo".

Dum la jaro 1963 aŭstralianoj trinkis proksimume 910 milionojn da litroj da biero - aŭ po ĉirkaŭ 83 litroj por ĉiu enloĝanto. Ĉi tiu estas la kvara plej alta kvanto en la mondo. Belgujo, Okcidenta Germanujo kaj Novzelando superas Aŭstralion.

Granda parto de ĉi tiu biero estis fortrinkita en netaŭga ĉirkaŭaĵo, sub nekomfortaj kondiĉoj, kaj je ekspresa rapideco. Komplikas ĉion la federacia sistemo de la lando: trinkleĝoj varias de ŝtato al ŝtato. En Nova Sudkimrujo, de kiu Sydney estas la ĉefurbo, baroj estas malfermaj de la 10-a atm gis la deka ptm. Pro tio la forĵeto du horojn antaŭ la Novjaro. Samaj leĝoj regas (kun malgrandaj ŝanĝoj) en Kvinslando, Tasmanio kaj Okcidenta Aŭstralio.

En Viktorio kaj Suda Aŭstralio, trinkejoj malfermiĝas je pli frua horo, sed devas fermiĝi jam de la sesa vespere. Pro tio ekestis la sovaĝa triba rito nomata "la kvinahora gargaro" (the five o'clock swill). Ĉi tiu komenciĝas je 5:30 ptm., kiam klientoj komencas kunpuŝe kaj kubutume impeti el la laboro kaj en la plej proksiman trinkejon. Tie, sardinece ĉirkaŭante la baron, ili pasas de mano al mano super la kapoj de la homamaso plenplenajn glasojn al tiuj kiuj staras malantaŭe. Tial la nomo gargaro....

Je 5:55 bruas sonorilo. Ĉi tiu estas la signalo ke la profesiaj trinkantoj aĉetu minimume ses pliajn glasojn, kiujn ili vicigas sur bretoj ĉe la muroj. Precize je la sesa fermiĝas la baro, sed la klientoj rajtas al 15 minutoj por fordrinki la bieron kiun ili tiel diligente konservis.

Ĝis la pasinta aprilo Sydney ankaŭ havis sian "gargaron", ĉar la baroj fermiĝis inter 6:30 kaj 7:30 por la "vespermanĝa paŭzo". La teorio de la paŭzo estis ke igas la edzojn reiri al la vespermanĝo, sed forigo de tiu ĉi leĝo tamen ne altigis la kvanton da fortrinkita biero: klientoj simple trinkis pli trankvile.

Ŝanĝojn de la nuntempe freneza leĝaro forte kontraŭstaras dommastrinaj asocioj kaj aliaj virinaj grupoj tra la lando. Sed same oponas ŝanĝojn eĉ la trinkejestroj mem, kiuj scias ke pli longaj horoj ne plialtigos iliajn vendojn sed simple devigos ilin dungi pli da servistoj. La australiaj trinkejestroj ne havas tiel altan reputacion eĉ inter la propraj samlandanoj. La trinkado de biero sub gargaraj kondiĉoj forigas la neceson ke ili igu siajn barojn allogaj kaj vizitindaj, ĉar ili ja pleniĝos ĉiuokaze.

Ĉu estas solvo de ĉi tiu mizera situacio? Laŭ la spertuloj, ĝi kuŝas ĉe la virinoj. Se la edzinoj nur konstatus ke drinkante iliaj edzoj neevitable (por Baupierre-i) nikas, ili komprenus ke ŝanĝo de la trinkleĝaro grandskale efikus je malaltigo de la eksedziĝaj statistikoj.

— laŭ raporto en <u>New York Times</u>

---

VERKISTOJ, VERKANTOJ KAJ VERKEMULOJ!
<u>Ni bezonas materialon por la JEN-Bulteno!</u>

La venonta (aprila) numero redaktiĝos denove en Novjorko. Sendu materialon al: JEN, 30 Avenue B, New York 9, N.Y.

La postvenonta (maja) numero estos redaktita denove de la Esperanto-Klubo de Harvard. Ĝi havos kiel ĝeneralan temon:

KIO MANKAS EN LA ESPERANTO-MOVADO?

Sendu viajn artikolojn al: Esperanto-Klubo de Harvard, Quincy House, Box 8, Cambridge 38, Mass.

Ni povas ĉion utiligi!

## 20-a INTERNACIA JUNULARO-KONGRESO DE T.E.J.O.
## Anne Frank Domo, Amsterdam. 8-15 augusto 1964

### Ĉu vi jam aliĝis al nia 20-a?

Se ne, bonvolu duonfermi la okulojn kaj rev-imagu: . . . afabla suno (au refreŝiga pluvo) super vicoj da individuaj tegmentoj ruĝaj kaj bluaj. Malnovstilaj fasadoj reflektiĝantaj en kvietaj grantoj. Neta domo inter tiuj, tuj apud svelta, majesta turo, jen la Anne Frank domo. En ĝi svarmas amaso da junaj homoj interbruante gajsfere. Poste regas silento solena: okazas la oficila inaŭguro en ĉeesto de diversaj altaj gastoj. Ankaŭ reprezentantoj de aliaj junular-organizoj (i.a. W.A.Y.) salutas la kongreson. Sekvas gvidataj vizitoj al la mallarĝaj ĉambroj supre, en kiuj vivetis la familio Frank sammaniere kiel miloj da aliaj, dum la kruelaj okupacaj jaroj 1940-1945. La Taglibro de Anne Frank datas ĝis 1944. Vespere tiun dimanĉtagon kronas speciala sinprezento de la fama, profesia Internacia Teatro, en luksa teatrosalono.

En la sekvanta tago la kongreson akceptos kaj rondveturadon donacos la magistrataro de Amsterdam. El blankaj salonboatoj vi admiros diversepokajn fasadojn, jen pompajn, jen ĉarmajn, el 1600 ĝis 1900. Vespere vi dumpromene ilin revidos enlumigitaj.

Postan tagon regalos nin la Amstel-bierfarejo per . .(neĝusta respondo!) . . per lunĉo kaj filmprogramo. La riĉan programon ebligis ankaŭ aliaj donacoj: de la ŝtato, de I.B.M., de Nutricia-laktofabriko, kaj de aliaj.

Ne forgesu la afablan vilaĝon Broek (pron.:"Bruk"), kiu arangos tutan, oficialan festosemajnon dum la kongreso.

La arbaroriĉa regiono "Het Gooi" estos nia ekskursejo. Ĝi estas kvazaŭ la ĝardeno de Amsterdam. Hilversum estas ĝia centro, kie la fama urbdomo el 1927 (eble enhavanta akcepteman urbestraron) kaj la AVRO-radio-ejo estos niaj viktimoj. Fine ni heroeinvados la aŭtentikan kastelon de Muiden, plantonte la Esperantoflagon sur la bastionoj. Jam en la 17-a jarcento tiu kastelo estis (kaj eĉ restos post nia invado) kultura centro.

Almiksu al ĉiĉio la ĝuon de interamika rendevuo, kaj rezulte jen revo pli ol rava. Estu bonvena!

## UNUAJ INFORMOJ PRI LA KONGRESO

**Protektanto:** La honoran protektantecon pri la 20-a I.J.K. akceptis la Rektoro de la Universitato de Amsterdam, prof.dr-o J. Kok.

**Organizantoj:** T.E.J.O.-Nederlando; Anne Frank Domo; Esperanto-Rondo en la Universitato de Amsterdam.

**Kongresurbo:** Amsterdam, la ĉefurbo de Nederlando. Kreskinta el fiŝista vilaĝo al komerca kaj kultura centro kun internacia etoso. En la malnova centro, kie estas la kongresejo, viciĝas la komercistaj domoj el la 17-a jarcento laŭlonge de la kanaloj (graĥtoj). Vivoplena haveno. Famaj muzeoj. Nokta vivo de pli kaj malpli bonaj specoj.

**Kongresejo:** Internacia Junularcentro "Anne Frank Domo", la domo kie, en la dua mondmilito, vivis kaŝite Anne Frank, kiu konatiĝis pro sia "Taglibro".

**Provizora programo:**
Interkona vespero; Diservoj; Kultura vespero; Akcepto; Rondveturo en boato tra la graĥtoj kaj haveno; Oratora Konkurso; Prelegoj kaj Diskutoj; Ekskursoj; Muzea vizito; Balo;Filmoj; Ekspozicioj; Laborkunsidoj de TEJO. (Aliaj programeroj estas kontraktataj kaj aperos en la gazetaro kaj radio).

**Aliĝoj kaj perantoj:**
LKK ne traktas aliĝilojn antaŭ ricevo de la kompleta pago. Aliĝilon kaj pagon do ĉiam sendu al la sama adreso. Informoj pri perantoj sekvos; ĝis tiam pagado estas ebla nur rekte al la kongresa poŝtĉekkonto (vidu supre) aŭ per poŝtmadato al la kasisto: W.F.Pilger, Vermeerstraat 7, Zaandam.
En kazo de neebleco partopreni, la aliĝinto ricevos la pagitan monon minus 10,-Ned.guld, kondiĉe ke la LKK estu informita pri tio antaŭ la 15-a de julio 1964-a.
LKK rezervas al si la rajton malakcepti aliĝon.

**Aĝlimo:** Aliĝantoj pli ol 25-jarajn LKKne akceptas, escepte de funkciuloj de TEJO, gastoj kaj en aliaj kazoj difinotaj de LKK.

| Kotizoj: | por anoj de TEJO* | antaŭ 1 aprilo | post 1 aprilo |
|---|---|---|---|
| | malpli ol 20-jaraj | **ned.guld.70- | 90- |
| | pli ol 20-jaraj | 75- | 95- |

Nemembroj de TEJO devas pagi 5 guld. pli.
La kotizo inkluzivas loĝadon, manĝadon kaj la kongresan programon.

Pagojn faru: rekte al: 20-a IJK de TEJO, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z, Nederlando - al kiu oni ankaŭ adresu ĉiujn informpetojn.

Ne hezitu, sed venu al Amsterdam! Kore bonvenigos vin la Kongresa Komitato - Hans Bakker, Ans Bakker, Wouter Pilger, Peter Broers, Romana Ruig.

---

*/ Ĉiu membro de JEN sub la aĝo de 25 jaroj estas aŭtomate ano de TEJO

**/Unu nederlanda guldeno valoras proksimume $0.28

---

GRAVA SCIIGO:

ELNA intencas aranĝi specialan malaltkostan flugon al Nederlando por la Universala Kongreso de Esperanto en Hago. Ni ne havas definitivajn informojn, ĉu au ne ĝi taŭgos ankaŭ por la TEJO-Kongreso (kiu okazos dum la semajno post la UK), sed ni sugestas ke interesitoj skribu rekte al la organizanto de la flugo - S-ino Dorothy Holland, 1976 Greenview Drive, Fayetteville, Ark. 72701.
Ankaŭ organizas karavanon al Hago portugala vojaĝoficejo kun oficejo ĉe 500 Fifth Avenue, New York (tel: LA4-3991) - vidu la pasintan numeron de la JEN-Bulteno.

La bonekonata fotokompanio Gevaert aranĝis en kunligo kun la Universala Kongreso kaj la Kongreso de TEJO grandan fotokonkurson. Simple necesas produkti foton pri la temo, el la Taglibro de Anne Frank: "Freneze mi amas la naturon, ĉu nur pro tio, ke dum longa tempo mi ne povis elŝovi mian nazon eksteren?"
Kompleta regularo estis jam publikigita en la Esperanta gazetaro. Oni ankaŭ povas havigi ĝin rekte de la supra adreso de la IJK.
La ĉefa premio en la konkurso estos belega medalo kaj 400 guldenoj ($110). Krome estos pluraj aliaj premioj, kaj speciala premio por la plej bona foto de juna (sub 26-jara) fotisto de medalo kaj $55.

## LA JUNULARA SOMERO

Notu la datojn kaj venu amase: amuzoplena restado atendas vin!

---

| | |
|---|---|
| Semajnfino de <u>19 Aprilo</u> | Renkontiĝo inter la gejunuloj de Novjorko, Harvard kaj eventuale Cornell, en Cambridge (dato kaj programo konfirmotaj) |
| Semajnfino de <u>7 junio</u> | Antaŭkongreso de JEN (pliajn informojn oni aperigos en la venonta JEN-Bulteno) |
| Semajnfino de <u>5 julio</u> | Kongreso de ELNA, Novjorko (kun specialaj arangoj por JEN-anoj - kaj rabato ĉe la kongresa hotelo) |
| 23 - <u>29 julio</u> | 30-a Kongreso de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, Valencia, Hispanujo (kun specialaj aranĝoj por gejunuloj) |
| 1 - <u>8 aŭgusto</u> | 49-a Universala Kongreso de Esperanto, Hago, Nederlando |
| 8 - <u>15 aŭgusto</u> | 20-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Amsterdam, Ned. |

---

<u>Notu ankaŭ ke</u>: La ĵus fondita hungara TEJO-sekcio planas organizi internacian junularan feriorestadon en Fonyod-Belatelep, ce la Lago Balaton, de la 9-a ĝis la 20-a de julio 1964. La prezoj por kompleta pensiono dum 12 tagoj kaj loĝado en du- au kvarpersona tendo aŭ en turista loĝejo varias inter $19 kaj $23.50.

<u>kaj</u>: La 3-a Paska Kultura Semajno sub aŭspicio de la franca Ministerio pri Nacia Edukado okazos de la 31-a de marto ĝis la 7-a de aprilo en la Kastelo de Gresillon, Bauge (Maine-et-Loire). Eminentaj esperantistoj prelegos pri diversaj temoj, kaj okazos kursoj. Oni donos senpagan restadon dum la semajno en la kastelo al esperantista junulo el ĉiuj landoj. Pliaj aranĝoj okazos en la kastelo tra la tuta somero.

<u>Pri aranĝoj en Eŭropo</u> kontaktu la JEN-estraranon pri eksterlandaj aferoj, Humphrey Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass.02138.

ORATORAJ KONKURSOJ EN 1964

Ni lastatempe ricevis la jenan leteron:

Karaj kaj estimataj samideanoj,

Oratoraj konkursoj estas konataj kaj ŝatataj esperantistaj aranĝoj. Ili edukas bonajn lingvouzantojn, instigas la gejunulojn al esprimado de siaj opinioj pri plej diversaj problemoj kaj prezentas ĝuon por la aŭskultantoj. Vi ĉiuj konas ilin. Utileco kaj populareco de tiuj aranĝoj estis refoje pruvitajen la pasinta 1963-a jaro.

Dum la 19-a Kongreso de TEJO en Vraca (Bulgario) kaj dum la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio (Bulgario) okazis verŝajne la plej sukcesaj internaciaj Oratoraj konkursoj ĝis nun. Ambaŭ altnivelajn konkursojn partoprenis po 9 gejunuloj el po 9 landoj. Intereso de la publiko estis grandega.

En la pasinta jaro okazis ankaŭ landaj Oratoraj konkursoj en 9 landoj. Aŭstrujo, Bulgario, Germanujo, Hispanujo, Italujo(2), Japanujo, Jugoslavio, Pollando(pluraj) kaj Svedujo. Gratulon al iliaj organizintoj!

Tiaj belaj spertoj el la pasinta jaro kvazaŭ postulas, ke Oratoraj konkursoj fariĝu konstanta praktiko ĉe gravaj landaj kaj internaciaj Esperanto-kongresoj kaj similaj aranĝoj, kiujn partoprenas ankaŭ aŭ nur junularo. Oratoraj konkursoj estas tiom utilaj kaj interesaj, ke ni devas ĝuste pritrakti ilian valoron. En tiu ĉi, kaj en venontaj jaroj! Se vi povas konsenti kun la supra konstato, la Estraro de TEJO petas vin, bonvolu tuj pritrakti la demandon de la oratoraj konkursoj en via lando dum 1964-a jaro. Ili povas esti en la kadro de la grupo, urbo, regiono, lando aŭ internacie - plej bone sur ĉiuj tiuj niveloj. Por la gajnontoj estu dediĉitaj konvenaj premioj (tute ne necese, ke temu pri monaj premioj). Ilin partoprenu junaj geesperantistoj aĝaj ĝis 25 jaroj. Oratoraj konkursoj okazu memstare aŭ en la kadro de iu alia esperantista aranĝo.

Internaciaj Oratoraj konkursoj okazos dum la 49-a UK en Hago kaj dum la Jubilea 20-a Kongreso de TEJO en

Amsterdam. Premioj estos ĉiel kutime konsiderinde altaj monsumoj. La temojn por la Oratora konkurso kompreneble starigas la organizanto.

Esperante, ke ni daŭre sukcese kunlaboros,
korege salutas vin

Svobodan Żlatnar
Estrarano de TEJO pri
kulturaj aferoj

Precipe en Eŭropo, oratoraj konkursoj estas bone konataj kaj ŝatataj inter TEJO-anoj. Ni ŝatus saman intereson ankaŭ vidi tie ĉi. Se entute estos sufiĉe da intereso, ni eĉ pretas organizi Oratoran Konkurson de JEN! Memoru, estontaj oratoroj, ke la premioj de la du supre menciitaj Konkursoj ĉi-somere en Eŭropo pli ol sufiĉus por pagi vian restadon ĉe ambaŭ kongresoj! Bonvolu nepre skribi al JEN se vi interesiĝas pri okazigo de nia propra konkurso ĉi tie en Nordameriko.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

DEZIRAS KORESPONDI....

(NI VOLAS SUBSTREKI ke ĉiam la JEN-Bulteno publikigos korespond-anoncojn senkoste kaj senhezite. Tamen, gravegas ke oni skribu preslitere aŭ per skribmaŝino, por ke oniaj nomo kaj adreso estu facile legeblaj)

17-JARA horloĝisto deziras interŝanĝi bildkartojn kun usonanoj - FRANTIŠEK HANAK, Tr.Komenského 59b, Nové Město, Ĉehoslovakio

KOMENCANTO 15-jara deziras korespondi pri ĉiuj temoj - HAJNAL BÉLA, Rákoczi út.39, Budakeszi, Hungario.

STUDENTINO de matematiko kaj fiziko en pedagogia kolegio, 18-jaraĝa, precipe pri arto (literaturo, filmoj, pentrado) - JARMILA KUZICHOVÁ, Jiráskova 82, Jihlava, Ĉehoslovakio.

18-JARA studentino de elektroteikniko , pri sia fako kaj pri poezio, astronaŭtiko, ŝako kaj aliaj temoj - DUBRAVKA JOSIĆ, ul.Bukovačka 37, Zagreb, Jugoslavio.

## ĈU VI LEGIS LA FLUGFOLION kiun vi ricevis kun la pasinta JEN-Bulteno?

Se ne, legu nun! — Estis io bona en ĝi por vi. Temas pri TEJO—Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kiu estas la junulara sekcio de UEA.

UEA donis al TEJO lastatempe specialajn avantaĝojn. Se oni estas: sub 21-jara, kontraŭ $4.50
inter 21- kaj 25-jara, kontraŭ $6.00
oni ricevos dum una tuta jaro
la monatan revuon Esperanto
la 2-partan, 600-paĝan Jarlibron de UEA
la novan revuon de TEJO, Kontakto.

Aliĝu tuj, aŭ petu informon ĉe: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. (UEA akceptas Usonajn ĉekojn.)

---

## ENGLISH SPEAKERS!

Learn Esperanto at home! The Esperanto Education Center offers you two outstanding ways to learn the international language, at unbelievably reasonable prices.

1. The Teach Yourself Esperanto Kit. The best available learning aids from around the world are here brought together in one box for your convenience.

From England: Teach Yourself Esperanto (200 pages), one of the world-famous Teach Yourself Series.
From France: Pronunciation record (45 rpm), with two voices, your key to a perfect international pronunciation.
From Canada: "Esperanto" (42 pages), an introduction to Esperanto that gives you all the basic information about the language, its history, and its use today.
From 3 other countries: samples of Esperanto in travel guides, newspapers, etc.
Plus: 3600-word English-Esperanto vocabulary, International Correspondence Blank, and more.

2. <u>The Harvard Esperanto Club Correspondence Course</u>. This is a pleasant and inexpensive way to learn Esperanto under expert guidance. The course combines the convenience of home study with the benefit of personal attention by a Harvard University student who is a skilled speaker of Esperanto. The course includes all of the materials in the Kit described above, <u>plus</u> individual guidance through a carefully planned study program of 15 lessons.

The cost? For the Kit ONLY $4, substantially less than the price you would pay if you bought the contents separately. You thus not only gain in convenience, and not only gain in the certainty of having the best materials, but you <u>actually save money</u> at the same time!

Even more sensational is the price of the Course: JUST $6! That means that for only $2 more you get personal instruction during your entire course of study.

Don't delay ordering the one you want; introductory prices like these can't last forever. Fill out the coupon below and send it with a check or a money order to:

Esperanto Education Center
P.O. Box 406, Cooper Station
New York, New York 10003

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Dear Sirs:

☐ I enclose $4. Please send me my Teach Yourself Esperanto Kit immediately.

☐ I enclose $6. Please enroll me immediately in the Harvard Esperanto Club Correspondence Course. I understand that my instructor will be a student at Harvard University.

Name ______________________________

Street ______________________________

City ______________ State __________ Zip __________